


**Gijón, oktobro 1990. Tria Astura Kongreso de Esperanto.**

La 70a numero de la revuo HELECO prezentas ampleksan informon pri tiu regiona E-kongreso kaj, interalie, iomete pritemas ankaŭ la **75an Universalan kongreson de Esperanto** kiu tiujare estis Havano. La informo pri la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** finas per la jenaj:

**Konkludoj de la kongreso:**

**1e. Danki al la institucioj kaj al la Socio ĝenerale, ĉefe al la Urba Konsilantaro de Gijón, Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo, Asturia Ŝparkaso, Agrokampara Ŝparkaso kaj Regiona Departamento pri Turismo, pro ties apogo por la celebrado de la kongreso.**

**2e. Danki al ĉiuj publikaj informiloj de la regiono pro ties atento kaj informado pri la kongreso kaj pri la problemoj de la internacia komunikado. Kadre de tiu procezo ASTURA ESPERANTO ASOCIO esperas ke la sukceso de ĉi tiu kongreso havu kiel fruktoj la realigon de Esperanto-kursoj pere de Radio kaj Televido samkiel estis dissenditaj per tiuj medioj aliaj kursoj pri fremdaj kaj regionaj lingvoj.**

**3e. Informi al la Institucioj kaj la Socio ĝenerale, ke la esperantista movado staras serve de la socio kaj ke sur tiu vojo oni entreprenas diversajn projektojn de kultura intereso, kiel la organizado, en nia lando, de internaciaj preŭniversitataj kursoj en Esperanto, okazontaj en la jaro 1993. Por la sukceso de ĉi tiu plano, estas necesa institucia apogo kaj monhelpo, kiel okazis en similaj projektoj. ASTURA ESPERANTO ASOCIO esperas ke ankaŭ en Asturio oni atingos helpon kaj kunlaboron por tiel ambicia projekto.**

Post tiu regiona kongreso, ĝis nun okazis neniu alia en Asturio. Ne estas pliaj urboj kun esperantista organizaĵo. Ĝis nun fiaskis niaj klopodoj starigi E-grupon en Oviedo kaj/aŭ aliaj lokoj de nia regiono. Fakte, unu el la ĉefaj labor-sesioj de tiu Tria E-Kongreso de Asturio estis tiu en kiu oni pristudis la problemaron de la E-movado kaj ties disvastigo. En la informo pri **AEA**, la prezidanto, inter alie, diris:

***Lastjare ni ne organizis E-kurson. La ĉefa tasko de ĉiu E-grupo, la disvastigo de la Internacia Lingvo, ne estis entreprenita de nia E-organizaĵo dum la lerno-kurso 1989-1990. Ne mankas al nia esperantista kolektivo la kapablo organizi E-kurso. Fakte, ekde la jaro 1975 ni ĉiujare gvidis bazan kurson de Esperanto, kaj iujare eĉ duan, progresigan kurson. Sed ni devas konstati kaj pristudi la fakton ke lasttempe draste malpliiĝis la nombro da personoj interesitaj pri la Esperanto-lernado. La lastaj kursoj de ni organizitaj altiris la atenton de nur tre malmultaj lernantoj, kiuj, multkaze, ne persistis ĝis la fino de la kurso…***

Pri la revuo **HELECO** oni prenis en tiu kongreso la decidon ke ĝi estu du-lingva, en Esperanto kaj en la hispana lingvo, laŭ sugesto de la HEF-Prezidanto Antonio Alonso Núñez.